

TEA-BULTENO

8^A JARO

MARTO - APRILO 2005

NUMEROJ 3-4

Marta Programo

01 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
04 - vendredo	20.00 - Falsaj Amikoj en Esperanto
05 - sabato	17.00 - SALA MASSIMA Programo por SIA
08 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
11 - vendredo	20.00 - Ĉu vi konas Trieston? Ekskurso en la pasinteco pere de bildkartoj!
15 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
18 - vendredo	20.00 - <i>Lecturae Dantis</i> en Esperanto
22 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
25 - vendredo	20.00 - Ni provu interpretadi!
27 - dimanĉo	Bonan Paskon al la tuta legantaro!
29 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo

Aprila Programo

01 - vendredo	20.00 - Pri Esperanto ĉe TELE4
05 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
08 - vendredo	20.00 - Trafoliumante PIV-on!
12 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
15 - vendredo	20.00 - Litovio, lando de la 90 ^a UK
19 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
22 - vendredo	20.00 - <i>Lecturae Dantis</i> en Esperanto
26 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
29 - vendredo	20.00 - Ni provu interpretadi!

Lunde, je la 20^a h, unua-grada kurso
Marde, je la 18^a h, progresiga kurso
Merkrede, je la 18^a h, unua-grada kurso
Ĵaŭde, je la 18h30, Koruso VERDAJ ANĜELOJ



Bildoj pri Trieste

Ne maltrafu interesan vesperon, rigardante projekciadon de triestaj bildoj de antaŭ tri-dek, kvindek kaj eĉ pli ol cent jaroj! Vi vidus kiel, laŭlonge de tiu tempopaso, ŝanĝiĝis via amata urbo, kio malaperis kaj kio restis, kaj ... ĉu vi sukcesos aŭ ne rekonu la diversajn vidaĵojn. Por testi vian memorkapablon aŭ sciojn pri via urbo, okazos konkurso kaj eĉ belan premion ricevos ties gajnonto!!

Triesto kaŝita

Jam for estas Karnavalo: dum tiu gaja periodo festantaj maskuloj plenigis la urbajn vojojn, kaj ĉercis kaj dancis, kantis kaj amuziĝis, forgesante dum kelke da tempo la ĉiutagajn zorgojn. Kaj poste, el tiu bela festado, kio restis? Certe belaj rememoroj, dum surstrate miloj kaj miloj da ... paperkonfetoj! Sed... ĉu vi scias kiu disĵetadis, unuafoje, tiujn buntajn paperaĵetojn?

LA INVENTISTO DE PAPERKONFETOJ
 Ĉe Piazza della Borsa preskaŭ komence de Corso Italia, en tiu malalta domo situanta centropozicie, kun tri balkonetoj, flanke de la konstruaĵo de arkitekto *Max Fagiani*, naskiĝis la "inventisto de paperkonfetoj".

Temas pri stranga rakonto, farĉita per naiva genieco, kiun tre malmultaj homoj konas.

Dum jaro 1876, tra la urbaj stratoj la karnavalo freneze gajis kaj laŭ la korso paradis karnavalĉaroj kaj maskuloj. El la domaj fenestroj kutime oni ĵetadis sur la defiladon konfetojn kaj rozpetalojn. Sur la centra balkoneto, staris dekkvarjara knabo, senmona kaj do, sen eblo aĉeti konfetojn aŭ ion ajn, kiu ekhavis brilan ideon: tranĉeti kolorajn paperfoliojn kaj ĵeti tiujn originalajn konfetojn surkapen de la pasantaj maskuletoj. Tiu estis elpensajo, kiun tuj multaj ĉeestantoj imitis. La "inventajo" fulme transiris al Vieno, poste al Venecio kaj de tie al la tuta mondo.

Je unua apero la paperkonfetoj kaŭzis eĉ la intervenon de la "ege zorgema aŭstra polico". Post la unuaj ĵetaĵoj la knabeto aŭdis sonorigi ĉeporde kaj antaŭ li sin prezentis la aŭtoritata ĝendarmo, petanta eksplikojn kaj klarigojn. *Ettore Fenderi* nomiĝis tiu knabeto, kiu, plenkreskule, iĝos eminenta scienculo en la kampo de nuklea fiziko. En la jaro 1926, li starigis en Romo la unuan laboratorion pri radioaktivaj esploroj.

Tiu elstara gravulo mortis 104-jaraĝa, praktike forgesita de la granda publiko, kaj lia "invento", nepatentita, rondiris la mondon kaj ankoraŭ hodiaŭ neblas okazigi feston aŭ karnavalon sen paperkonfetoj.

3ESTULO

La esperantista pioniro don Giacomo Bianchini
 NOVA ESPERO FRIULI organizas ekspozicion kaj kunvenon pri DON BIANCHINI KAJ ESPERANTO en **Cimpello di Fiume Veneto**, apud Pordenone, **sabaton la 18^{ma} de junio**. La programo antaŭvidas prelegojn de Rev. Don Antonio Zanette, ĉefartikolisto, prof. Giovanni Strasiotto, loka verkisto, kaj prof. Carlo Minnaja, kiuj prezentos la pastron, ties vivon kaj rilatojn kun Esperanto. La ekspozicio elmontrus dokumentojn, fotojn kaj librojn de tiu grava esperantisto.

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO, VEREIN DER
ÖSTERREICHER KAJ DEUTSCHES HILFSVEREIN
invitas Vin kune festi la

37^{an} Semajnon de Internacia Amikĉeo

Sabaton la 5^{an} de marto 2005 je la 17^a horo
ĉe Sala Massima, via del Coroneo 15

Muziko kaj Poezio, amikĉeo

Programo: ludado de klasika gitaro, François STRIDE;
operarioj kun SILVIA MOSCO - soprano, kaj Cristina
MAIORANO - pianistino; legado de poeziaĵoj kaj, fine,
tradiciaj kantoj prezentitaj de la Virinvoĉa Koruso IVAN
GRBEC.



Estimataj ALP-ADRIANOJ,

lastofoje ni renkontiĝis en Rijeka -
Kroatio por la 14^a Konferenco de nia
Rondo kaj poste ... silento. Neniu sin
anoncis por nova aranĝo ĝis nun, sed
mi opinias, ke estas tempo reveni al
tradiciaj kutimoj.

Pro tio, TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO decidis, post poziti-
vaj interparoloj kun slovenaj kaj kroataj esperantistoj,
okazigi en Triesto la 15^{an} Konferencon, kiel sekvas:

Dato: 21^a kaj 22^a de majo 2005

Temo: ADRIATIKA MARO, RENKONTIĜEJO DE
LINGVOJ KAJ KULTUROJ DIVERSAJ

Jen ĉi-sube la provizora programo (ankoraŭ plibonig-
enda, ankaŭ per viaj sugestoj).

Prezentos referaĵojn pri la temo:

- ★ d-ro Carlo Minnaja - Padova - Lingvo, libroj kaj
protokoloj en la teritorio de Venecio;
- ★ prof. Bardhyl Selimi - Tirana, prelegos pri lingvo kaj
kulturo albanaj;
- ★ kaj krome Marija Belošević - Zagrebo, iu el Slove-
nio, kaj aliaj;
- ★ Diversaj aspektoj de Adriatika Maro per bildoj kaj
muziko - prezentado de Giorgio Ferneti
- ★ Vizito de scienca mara institucio en Triesto.

Bonvolu informi nin pri via ebleco partopreni kaj, kiel
eble plej, disvastigu la aranĝon en viaj Esperanto-grupoj
kaj landoj. Ni tre ĝoios bonvenigi vin jam vendrede
posttagmeze, sed, ĉikaze, antaŭanoncu vian venon.

Bonvolu kiel eble plej rapide kontakti nin, ĉu per ordina-
ra poŝto: **ESPERANTO TRIESTE**, CP 601, IT-34100 Trie-
ste Centro, Italio, ĉu per elektronika poŝto:
noredv@tele2.it kaj testudo@adriacom.it

HISTORIAJ PROBLEMOJ

LA TOMBO DE DIOFANTO

Sur la ŝtonplato de la tombo de Diofanto estas skribite:
“Ho, vi, hazarda piediranto, se vi volas ekscii kiom da
jaroj mi vivis, sciu ke mia infanaĝo okupis 1/6 de la vi-
vo, dum la junuleco 1/12; post kiam pasis 1/7 de la vivo
mi edziĝis kaj post kvin jaroj fariĝis patro kun filo, sed
malbonŝance filo mia mortis kiam mi atingis la duonon
de mia vivoaĝo. Poste mi min okupis pri matematiko
pliajn kvar jarojn, por min konsoli, ĝis fine mi mortis”.

Demando estas: Je kiu aĝo mortis Diofanto?

La redaktanto atendas vian respondon. Inter la solvantoj
estos lotumita esperanta libro! Bonan kalkuladon!

Antaŭnelonge okazis, fare de la tutlanda gazetaro, debato pri la oportuno aranĝi, en lernejoj vizitataj ankaŭ de islamaj lernantoj, prezentadojn de la Naskiĝo de Jesuo, simboligita laŭtradicie per la Kripo. Ferdinando Camon, eminenta itala ĵurnalisto, verkisto kaj eseisto, aparte tre sentema pri sociaj kaj lingvistikaj problemoj, intervenis per rimarkindaj konsideroj pri tradicioj kaj identeco de diversaj civilizacioj kiuj renkontiĝas, en hodiaŭa tempo. Temas pri vere pensiga artikolo, publikigita en IL PICCOLO, ĵurnalo de Trieste, la 16^{an} de decembro 2004.

Gastiganta kulturo eĉdas antaŭ al tiu fremda

Post 50 jaroj fino de nia identĉeo

de Ferdinando Camon

Tiu ĉi lamenta aserto de la episkopo en Padova validas por ĉiuj italaj urboj, eĉ pli por tiuj el Nord-Italio, de Trieste al Bolzano, al Torino: “tiu ĉi urbo”, li diris, “ne havas estontecon”, ĉar ĝi suferas pro daŭra demografia malkresko, tial do ĝi estas mortanta. Ĉiujare ties loĝantaro malpliĝas je ĉirkaŭ mil personoj. Krome ... ĝi maljuniĝas. Ne plu estas renovigaj ŝanĝoj. Tamen la urbestro pliiĝustigis tiujn donitaĵojn: reale la loĝantaro plue kreskas, kaj la nombra rilato inter naskitoj kaj mortintoj estas favora, sed tio veras nur se kalkuli la naskitajn filojn de individuoj, tien ĉi novalvenintaj el ĉiuj mondo-partoj, precipe el Orienta Eŭropo, Albanio kaj Norda Afriko. Ĉikaze oni devas alimaniere pritaksi la lamenton de la episkopo, kaj, miaopinie, serioze ĝin pesi: ne veras, ke “tiu ĉi urbo, tiuj ĉi urboj ne havas estontecon”; veras, ke ili certe havos ian estontecon, kiu ne estos la kontinueco de ilia pasinteco.

Post kvindek jaroj, se oni laŭiros tian vojon, Trieste, Trento, Padova, Verona, Vicenza, Treviso, Venezia, Belluno, Bolzano, Udine, Pordenone, Varese kaj ĉiuj urboj de Norda Italio, havos socian konsiston, kulturon, religion, edukadon, kies specifaj karakterizoj tre malproksimos de tiuj nuntempaj. La polemika argumentado, jam plurfoje pridiskutita en naciaj ĵurnaloj, ĉu konservinda la kutimo publike elmontradi, okaze de Kristnaskaj tagoj, la Kripon aŭ ĝin tute forigi, ĉikadre fariĝas signifoplena: temas pri kroma mozaikero, parto de niaj tradicioj, de nia identeco, kiu riskas esti nuligita. Kiam iu kristana tradicio estas forviŝita, fare de la instruistoj, en klaso de tridek-kapa lernantaro, ĉar en tiu sama lerno-ĉambro kunestas du lernantoj, apartenantaj al alia religio, kiuj probable tion ne komprenus, tio signifas, ke oni jam cedis je la unua interbato: ĉar temas pri kunpuŝiĝo inter du lernantoj, kun fortaj sentoj pri propra identeco, kaj la ceteraj tridek, kies identecaj sentoj estas tre feblaj. Oni antaŭvidus ĝuste la malon, fronte al enmigra situacio: fakte la enmigra kulturo devus adaptiĝi al la gastiganta kulturo, montri sin respektema, eviti konfliktojn, klopodi por serena kunvivado, ne superforti ĝin. Kontraŭe, tro da okazaĵoj en Italio ekzemplas pri la fakto, ke la gastiganta kulturo estas silentema, timema, preta rezigni ankaŭ tiun spacon nepre necesan por pluvivado.

Neniam ĝis nun oni eldiris ion similan, sed mi kredas ke bedaŭrinde, tute sendube, oni povas ĉi tion aserti: islamanoj estas islamanoj sed kristanoj ne plu estas kristanoj. La demando, kiel estos niaj urboj post kvindek jaroj, konsistigos defion por tiuj kiuj heredos nian histo-

tion kaj kiel ili uzados ĝin. Francio, Germanio kaj Britio, kiuj jam havis tiajn problemojn antaŭ ol ni, klopodis regadi la enmigradon, enigante ĝin en la naciajn historion kaj civilizacion. Germanoj starigis devigajn kursojn pri germana lingvo por la nov-alvenintoj. Hodiaŭ la ĵurnaloj substrekas la intencon de Francio, volanta *francigi* eĉ la imamojn, ekde tiu de Parizo. Iuj ministroj eĉ ekpensis proponi, ke en moskeoj oni kultoficu franca-lingve. Sed ja temas pri fiaskintaj projektoj! La franca, germana kaj brita registaroj jam agnoskas, ke integriĝado tute ne progresas. La intenco estis eduke formi la nov-alvenintojn, por ke ili rekonu la laikecon de la Ŝtato kaj respektu la regulojn de la Konstitucio, ĉar, nur obeante al ĝi, loĝanto en Francio povas esti plenrajte konsiderata franco, loĝanto en Germanio germano ktp.

Se integriĝado malsukcesis/as, tio ne okazis/as, ĉar la gastiganta popolo ne malfermiĝas al la enmigraanta popolo, tiel haltigante ĉian proceson de kunvivado, sed male, ĉar la migradanta ondaro starigas (naskigas-originas) grupojn de homoj konservativaj, malkomunikiĝemaj kaj malintegriĝemaj. La integriĝa modelo de francoj, germanoj kaj britoj, antaŭvidinta kontinuecon en la lokaj kulturo kaj historio, nu akre krizas. Ni estas evoluantaj al usona modelo, en kiu tiu kontinueco estas interrompita, kaj la multnombraj kulturoj, kunvivas ja, sed disigitaj kaj memstaraj, ĉiuj fermitaj en propra ŝelo. Sed en Usono almenaŭ ekzistas tia kungluaĵo kia la Konstitucio, sur kiu ĉiu devas ĵuri, por iĝi usonano. Ni, eĉ tion ne havas!

(trad. Elda Doerfler)

Eblas pluŝ subskribi Manifeston 2000

En 1999 UNESKO lanĉis kampanjon por kolekti subskribojn por MANIFESTO 2000, kiu estis iniciatita de grupo de laŭreatoj de la Nobel-premio pri paco. Origine la kampanjo celis daŭri nur en la jaro 2000, kiu estis proklamita kiel Internacia Jaro por Kulturo de Paco. Inter ĉiuj Ne-Registaraj Organizaĵoj UEA, kies tiujara kongreso en Tel-Avivo estis distingita de UNESKO kiel Flagŝipa Evento de la Jaro, estis unu el la plej aktivaj kolektantoj de subskriboj por la MANIFESTO 2000.

Ties ses bazaj principoj estas:

- ♥ Respekti ĉiun vivon;
- ♥ Rifuzi perforton;
- ♥ Dividi kun aliaj;
- ♥ Aŭskulti por kompreni;
- ♥ Konservu la planedon;
- ♥ Remalkovri solidarecon.

Ĉar la enhavo de MANIFESTO 2000 restas daŭre aktuala, UNESKO decidis daŭrigi la kolektadon de subskriboj dum la tuta Internacia Jardeko por Kulturo de Paco, t.e. ĝis la jaro 2010. Tial estas ree malfermita la ebleco rete subskribi la Manifeston 2000 en la ttt-ejo de UEA ĉe la adreso: <http://www.uea.org/agadoj/projektoj/manifesto2000.html>

Eblas ankaŭ peti paperajn ekzemplerojn de la MANIFESTO por kolekti subskribojn ekz. en Esperanto-aranĝoj kaj lokaj grupoj kaj por poste sendi ilin al UEA. Oni povas peti ilin ĉe uea.unesco@esperanto.org aŭ ĉe la Centra Oficejo.

Ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero

El Proverbaro Esperanta

Filatelo kaj Esperanto

La ĉeĥa poŝto eldonis poŝtmarkon omaĝe al ĉeĥa juda knabo Petr Ginz (1928-1944), kiu pereis en gaskamero de Auschwitz. La poŝtmarko estas videbla je la adreso <http://kosmos-news.kosmo.cz/ginz-znamka.htm>. Samtempe aperas en la ĉeĥa lingvo la taglibro de Petr, de li skribita en la koncentrejo Terezin. La verkon eldonigis lia fratino Ĥava Pressburger. Petr Ginz estis tre lerta, plurtalenta knabo, filo de ge-esperantistoj kaj mem esperantisto: per desegnado kaj verkado, li flugis for de la terura atmosfero de la koncentrejo kaj sukcesis tiel elteni la nepriskribablajn kondiĉojn de sia karcero.

Pri lingvaj homaj rajtoj ĉe UN-Komisiono

Pro siaj konsultaj rilatoj kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UNUIĜINTAJ NACIOJ, UEA havas la rajton liveri al ties organoj skribajn dokumentojn, rilatantajn la tagordajn punktojn de iliaj kunvenoj. Uzante tiun eblecon, prez. Renato Corsetti sendis dokumenton al la UN-Komisiono pri Homaj Rajtoj por distribuo inter la membroj de ĝia 61^a sesio, kiu kunvenos en Ĝenevo de la 14^a de marto ĝis la 22^a de aprilo.

Per ĝi UEA atentigas la Komisionon, ke laŭ la dua artikolo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en la Deklaracio apartenas al ĉiuj homoj sen diferencigo i.a. laŭ lingvo, sed malgraŭ tio, UN kaj ĝiaj membroŝtatoj donis al la lingva aspekto de la homaj rajtoj malmulte da atento ĝis nun.

La dokumento de UEA elstarigas la negativajn sekvajn de edukado de infanoj en alia lingvo ol la gepatra. Laŭ multaj esploroj, uzo de netaŭga lingvo en lernejo estas unu el la plej gravaj kaŭzoj, aŭ eĉ la plej grava kaŭzo, de antaŭtempa forlaso de lernejo, kiu siavice kondukas al seriozaj sociaj problemoj, ĉar ĝi pligrandigas la riskon je senlaboreco, krimado, alkoholismo kaj drog-uzado. Laŭ studo de UN mem, la plej malriĉaj landoj povus ŝpari grandegajn sumojn, se la lingvaj homaj rajtoj de iliaj loĝantoj estus respektataj per uzado de lokaj lingvoj en instruado. Pli ĝenerale UEA komentas ankaŭ la uzon de nur kelkaj difinitaj lingvoj por kontaktoj inter homoj de malsamaj popoloj kiel malkontentigan kaj diskriminacian praktikon kaj kiel kontraŭdiran al la dua artikolo de la Universala Deklaracio.

UEA proponas, ke la Komisiono starigu laborgrupon por pristudi la problemojn de lingvaj homaj rajtoj kaj la malobservon de homaj rajtoj pro lingvaj malegaleco kaj maljusteco. En sia raporto la laborgrupo devus proponi mez- kaj long-perspektivajn agojn por certigi lingvajn homajn rajtojn en diversaj lingvaj kaj kulturaj situacioj. La Komisiono devus ankaŭ apogi la klopodojn de fakuloj, interalie de UEA, esplori kaj eksperimenti la plej efikajn manierojn elekti la lingvojn uzotajn en lerneja instruado, kun la celo respekti lingvajn homajn rajtojn kaj kuraĝigi la evoluon en la koncernaj landoj.

UEA ankaŭ renovigas sian malnovan proponon, ke la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN metu la temon "Lingvaj kaj Homaj Rajtoj" en la tagordon de unu el siaj estontaj kunvenoj.

el Gazetaraj Komunikoj de UEA

MALLONGE PRI...

Sekve de iniciato de s-ino Penny Vos, novembre 2004 kreiĝis agadgrupo por enkonduki Esperanton ĉe la nereĝistara organizaĵo PACŝIPO. La ŝipo ĉirkaŭvojaĝas la teron 2/3-foje jare kun la celo helpi lokajn aktivulojn en la agado porpaca kaj disvastigi sciendaĵojn pri nuntempaj problemoj sociaj, homaj, naturmediaj. Surŝipe konferencoj, prelegoj kaj lingvistudoj pretigas la vojaĝantojn al la havenaj renkontoj. Nia laborgrupo sukcese progresas en la rilatoj kun la respondeculoj de la Pacŝipo. Bezonatas agemuloj en la havenoj vizitotaj. Pliaj informoj ĉe: <http://www.kontakto.info/pacshipo.html>

Informis STEFANO pacshipo@kontakto.info

29^a Internacia Junulara Festivalo apud Venecio! Ĝi okazos en *Lido di Jesolo*, apud Venecio (Italio) de la 23^a ĝis la 29^a de marto 2005! Ne maltrafu ĉi tiun belegan internacian sperton. Informas Itala Esperantista Junularo - IEJ: ijf.admin@esperanto.it iej@esperanto.it. Tuja aliĝo ĉe TTT-ejo: <http://iej.esperanto.it/iej/ijf/2005/alig.php>

La Unua 100^a Kongreso de Esperanto okazos en Skotlando! La Esperanto-Asocio de Skotlando fieras anonci ke ĝi celebros la 100^{an} Skotan Kongreson de Esperanto de la 10^a ĝis la 13^a de junio 2005 en la apudmara urbo Largs. Jam antaŭvidita estas prelego de Renato Corsetti, la prezidanto de UEA. La ĉefa temo estos LA SKOTA SKOLO, pri kiu intervenos unu el la skolanoj, John Francis. Ĉeestos ankaŭ D-rino Marjorie Boulton kaj D-ro Paul Gubbins. Depost la unua skota kongreso de Esperanto, ĉiujare okazis kongreso en Skotlando, eĉ dum la militaj jaroj. "Tiel la nia estas la plej altnumera, alie dirite la plej oftokaza, en Esperantujo", tiel fiere anoncas Skota Esperanto-Asocio, kiu deziras, ke la evento estu kiel eble plej internacia kaj pro tio invitas ĉiujn, de ĉie ajn en Esperantujo, aliĝi al la kongreso. Detalojn oni trovos ĉe <http://www.skotlando.org> aŭ oni povas kontakti la Esperanto-Asocion de Skotlando ĉe

secretary@skotlando.org [+44 (0)1698 263 199]

La aliĝintoj al la 90^a Universala Kongreso en Vilno (23-30 julio 2005) fine de januaro nombris jam 1300 el 50 landoj.

La ĉijara KONGRESO DE ITALAJ KATOLIKOJ (UECI) okazos en Vitorchiano (provinco de Viterbo) de la 2^a ĝis la 7^a de junio. Samtempe oni aranĝos ankaŭ la tradician PRINTEMPAN KUNVENON, zorge de la milana katolika grupo. La unua bulteno troveblas ĉe TTT-ejo:


www.ikue.org/ueci/kongreso.htm

La 73^a Itala Kongreso de Esperanto okazos en Rimini, de la 2^a ĝis la 7^a de septembro 2005. Temo estos: INTERKOMUNIKADO, FONTO DE PROGRESO: LA UNIVERSALAJ LINGVOJ. Jen la adreso de la Kongresa Organiza Komitato: Viale Zavagli 73 - 47900 Rimini

LA GAZETO Ĉu vi jam renovigis vian abonon al LA GAZETO? La abono egalas al 27 € kaj por novaj abonantoj estas speciala, aparta, tre interesa rabato! Por pliaj informoj, poŝte, rete aŭ telefone, vidu ĉi sube.

Abon-peranto por Italio

Elda Doerfler - Via del Bosco 24 - 34131 Trieste
tel. 040 763244 - testudo@adriacom.it
Poŝta konto: N° 17452996 Trieste Centro



Ekde tiu ĉi numero de TEA-BOLTENO ni prezentas al vi novan rubrikon, kies titolo tutsimple estas: "Tiel mi kuiras! Kaj vi?". La celi koni pli funde unu la alian

lo estas kaj ankaŭ diskonigi sin.

Alproksimiĝi al kulturo de aliaj popoloj estas unu el niaj ĉefaj celoj kaj konatiĝi kun la kuirarta kulturo signifas eniri en familian medion, sidiĝi ĉe komuna manĝotablo kaj gustumi nekonatajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn.

Do, per ĉi tiu rubriko ni invitas vin proponi receptojn tipajn de viaj lando, regiono aŭ urbo, receptojn de via patrino aŭ eĉ de via praavino.

Por komenci, jen specialaĵo el Senegalio! Atente legu kaj poste pretigu ĉi tiun pladon por viaj familianoj kaj... bonan apetiton!

KOKAĴO LAŬ "YASSA" STILO

Tradicia manĝaĵo de Casamance [Kazamans], suda parto de Senegalio, ĝi estas unu el la plej famaj receptoj de Okcidenta Afriko. En tiu sama marinaĵo kuireblas ankaŭ fiŝaĵo. el TTT-ejo de afrikaj receptoj: www.congocookbook.com

Ingrediencoj (por 4/6 samtabloj)

125 ml	arakidoleo
ĉ. 1 kg	da distranĉita koko
4 aŭ 6	cepoj, one tranĉitaj
8 supkukeroj	da lemonsuko
8 supkukeroj	da vinagro (prefere el pomoj)
1	laŭfolio
4	ajlbulberoj dispremitaj
2 supkukeroj	da akra mustardo
2 supkukeroj	da sojo
1	haketita papriko
1	eta florbrasiko, dike tranĉita
2 aŭ 3	karotoj dike tranĉitaj
	salo k pipro

Preparado: Per oleo, vinagro, lemonsuko, ajlo, laŭra folio, mustardo, sojo kaj cepoj, pretigu marinaĵon. Ĝin ĝustigu per salo kaj pipro. En la miksaĵo tutnunkte marinu kokon. Elprenu la kokon kaj subrostu ĝin dum malmultaj minutoj en fritilo kun oleo. Intertempe fritetu la cepojn de la marinaĵo. Aldonu restantan marinaĵon, brasikon, karotojn kaj paprikon. Boligu kaj kuiru dek minutojn, ĝis ekpretigo de densa saŭco. Malpliigu fajron kaj aldonu la kokidon. Kovru kaj finkuiru ĝin. Servu kun rizo aŭ kuskuso, pligustigita per kikeraj kaj rosinoj.

pomvinagro	vinagro farita el pomoj
florbrasiko	NPIV p.170, n. 8
friteti	rapide friti
densa	koncentrita
rosino	sekigita vinbero

Parta enhavo de ĉi tiu Bulteno fontas el RET-INFO e NOVA SENTO

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Coroneo, 15 - 34133 Trieste

tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperantotrieste@adriacom.it; noredv@tele2.it

<http://arte.triesteincontra.it/esperanto>

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349